

Esperanto-vivo en Svislando, 5-a parto
Simile al subevoluintaj landoj
Claude Gacond, 394-a radioprelego, 1971.04.28 & 05.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- En la hodiaŭa mondo kunekzistas landoj kaj socioj, kiujn ni nomas evoluintaj kaj subevoluintaj.

Cl.- Kio karakterizas la homgrupojn en la evoluintaj landoj kaj socioj, tio estas la komplekseco de la interrilatoj. Kontraŭe en la subevoluintaj landoj inter la homgrupoj preskaŭ komplete mankas interrilatoj. En tiuj landoj kaj socioj la homgrupoj tendencas formi fermitajn rondojn, kiuj vivas por si mem.

A.- La interrilatoj disvastigas la progreson kaj novaĵojn ege rapide. Kontraŭe en societo, kie la homgrupoj formas inter si fermitajn rondojn, la vivŝanĝoj estas ege malrapidaj.

Cl.- Ofte la minoritatoj tendencas sin protekti kontraŭ la eksteraj influoj per la starigo de muroj inter si kaj la aliaj socioj. Tiuj muroj protektas ilin, sed samtempe ili kaŝas al ili la vivrealecon.

A.- Jen iomete la situacio de la esperanto-movado en Svislando. Por povi praktiki esperanton la esperantistoj tendencis formi fermitajn rondetojn. Tiu fermeco permesis la kulturadon de la lingvo internacia ekstere de tro granda nombro da komencantoj kaj krokodiloj.

Cl.- Sed samtempe ĝi havis maltaŭgan konsekvencon. Kiel en la subevoluintaj socioj, tiuj esperanto-grupoj tendencas formi fermitajn rondojn, kiuj vivas por si mem.

A.- Dum la tri pasintaj jaroj, kiel sekretario de Kultura Centro Esperantista, mia edzo havis la okazon viziti la esperanto-grupojn en Svislando. Li rimarkis, ke tiu fermeco kondukis al tendencoj, kiuj karakterizas ĉiujn subevoluintajn sociojn.

Cl.- Unu el tiuj tendencoj estas konsideri la homgrupon kiel celon. Tiam ĉiu evoluo, ĉu progreso, ĉu ŝanĝo ŝajnas danĝero. De instrumento, kiu faciligas la praktikadon de esperanto, la loka klubo fariĝis por multaj esperantistoj viv-celo. Kaj nun, kiam intergrupaj rilatoj montriĝas pli kaj pli urĝe necesaj, tiuj esperantistoj ektimas tiun evoluon.

A.- Tiam ili similas al la loĝantoj de subevoluinta vilaĝo, kiuj rifuzas pli komfortan vivon por defendi siajn kutimojn kontraŭ la novaĵoj venantaj de la ekstervilaĝaj influoj.

Cl.- La lokaj grupoj ludis ege gravan socian rolon, kiam la homoj malmulte vojaĝis. Sed post la dua mondmilito, kiam la landlimoj malfermiĝis, kiam pli kaj pli da homoj posedis aŭtomobilon aŭ povis pere de turismaj agentejoj feriadi en foraj regionoj, tiam la rolo de la esperanto-grupo estiĝis. De sola loko, kie la plimulto povis praktiki esperanton kaj aŭdi raportojn de la vojaĝemaj membroj pri partopreno en kongresoj, la grupoj tendencas fariĝi preparejo al irado al plej diversaj kongresoj kaj feri-restadoj.

A.- Iom post iom, dank'al la pliboniĝo de la internaciaj esperanto-periodaĵoj, montriĝis eĉ nenecese partopreni la lokan esperanto-vivon. Nur legante la revuojn *Esperanto* de UEA, *Sennaciulo* de SAT aŭ *Heroldo de Esperanto*, oni ricevas tre bonan informadon pri la esperanto-aktualeco, pri la okazontaj kaj okazintaj manifestacioj, pri la enhavo de la novaj libroj.

Cl.- Tiam multaj aktivaj kaj tre vojaĝemaj esperantistoj, kiuj ĉiujare partoprenas kongresojn, tendencis ne plu partopreni la kunsidojn de la loka societo. La diferenco inter la kultura nivelo de la internaciaj aranĝoj kaj tiu de la loka grupo ne favoras tiun lastan. Tiuj esperantistoj ne

Esperanto-vivo en Svislando, 5-a parto
Simile al subevoluintaj landoj
Claude Gacond, 394-a radioprelego, 1971.04.28 & 05.01

komprenis, ke dum en la kongresoj ili povas pasive profiti pri la kultura progreso, en la loka vivo ili ne povas esti pasivuloj. Oni atendas de ili iun aktivecon.

A.- Ni vivas en lando, kie la aktivuloj ne senlaboras. Multaj societoj atendas ilin, kaj la plej potencaj salajras la laboron de siaj respondeculoj. Pro tio la labor-fortoj tendencas forlasi la eterne rekomenc-endan kaj neoficialigitan poresperantan laboron, profite al pli profitigaj aktivecoj.

Cl.- Tiu evoluo estis malfavora al la loka esperanto-vivo. Iom post iom la grupoj etiĝis. Ili tendencis fariĝi amikaj rondetoj, kie la gvidantoj ne ĉiam estas la plej kapablaj lingve kaj spirite. Pro tio la plej kapablaj esperantistoj, la solaj, kiuj estus povintaj gvidi superajn kursojn, ofte definitive rompis la kontaktojn kun tiuj grupetoj.

A.- Tio ne favoris la intergrupajn rilatojn. Tio ne faciligas la disvastigon de esperanto fare de la lokaj societoj. Tamen esperanto ne ĉesis disvastiĝi. Sed la novuloj ne sentas grandan simpatian al tiuj fermitaj rondetoj. Ili lernas esperanton por povi larĝigi sian agadkampon, kaj jen la grupoj starigas murojn inter la esperantistoj. Pro tio, kiel ni vidis en pasinta prelego, tiuj novuloj tendencas resti izoluloj, kiuj partoprenas la oficialan esperanto-vivon, nur kiam ĝi respondas al iliaj idealoj.

Cl.- Tamen la grupoj varbas novajn fortojn. Bedaŭrinde inter ili tro abundas la soluloj, kiuj venas al esperanto, ĉar ili trovas en la loka esperantistaro amikaron, kiu fermas la okulojn koncerne al la individuaj psikopataj mankoj. Ĉar tiu novularo trovis en la esperanto-grupo amikaron, kiu semajnon post semajno aŭ monaton post monato forgesigas la individuan solecon, ĝi tendencas konsideri malamike ĉion, kio estas proponata por modernigi la esperanto-vivon.

A.- Tamen tiu modernigo sin neeviteble trudos. Socio povas portempe rezisti al evoluo. Nun en Svislando pli kaj pli viglaj estas la esperantistoj, kiuj laboras en la direkton de intergrupa kunlaboro. La venontan semajnon ni montros, kio povos esti tiu kunlaboro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-